I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

## Z A M E N H O F - M O N U M E N T O

Starigota en Wien en 1958.

Ne miru ! Nun la Katalogo estas finita kaj mi havas la tempon efektivigi favordeziron de multaj samideanoj en la diversaj landoj starigi modestan sed indan monumenton al nia Majstro, kiu en la jaroj 1888 kaj 1897 vivis dum certa tempo en Wien, studante oftalmologion, en Wien, kies urbestro estas nia samideano, en Aŭstrio,kie en 1913 la unua Esperanto-Monumento en Franzensbad,tiam Aŭstrio, estis inaŭgurita, en Aŭstrio,kie la unua Esperanto-poŝtstampo estis uzata en la Universala Kongreso en Krakovo 1912(tiam Aŭstrio), en Wien,kie la unua lektorato por Esp.en la mondo estis kreata 1917 en la Teknika Altlernejo Wien,kie 1924 kaj 1936 okazis Universalaj Kongresoj de Esperanto, kie 1924 la unua ŝtata ekzamenkomisiono por Esp.-Instruistoj estis kreita, en Wien,kie alligata al la mondfama Aŭstria Nacia Biblioteko funkcias la en la mondo unika Internacia Esperanto-Muzeo en 5 salonegoj de Hofburg(iama imperiestra Kastelo), en Aŭstrio, kie en Wörgl (Tirol) la unua Zamenhof-Monumento en Eŭropo 1952 estis kreita(Inicianto s-ano Hans Steiner,samnomulo sed ne parenco).

La P R O T E K T O R A T O N transprenis

Federacia Kanceliero de Aŭstrio sro Inĝ. Julius R A A B .

Jen la listo de la HONORA KOMITATO ,en kiun estis invitataj la Estraro de UEA, la Prezidantoj de SAT, IKUE kaj UL kaj kelkaj aliaj eminentaj samideanoj:

BASTIEN Louis, Intendant-Generalo em.,Akademiano, Honorprezidanto de UEA,Paris
BECKERS A., Paroĥestro, Prez.de Intern.Katolika Unuiĝo Esp-ista,Kwaadmechelen, Nederlando
HERRMANN Dro Wilhelm,Estrarano de UEA, Prez.de Germana Esp.-Asocio,Lampertheim
JAKOB Hans, em.Direktoro de UEA, Honora Redaktoro de "Esperanto",Genève
LLECH-WALTER René ,Gradué en droit,Estrarano de UEA, Perpignan
MABESOONE P.M.,Vicprezidanto de UEA, Amsterdam
MAILLARD Dro Gaston, Dojeno de la Esperanto-Movado,Bourg-la-Reine
NYLEN Paul, Dojeno de la Esperanto-Movado,em.Ĉefredaktoro, Stockholm
PRIVAT Dro Edmond, Prezidanto de Universala Ligo, Honorprezidanto de UEA,Neuchatel
WÜSTER Dro techn.,Docento, DiplInĝ.,Fabrikanto, Wieselburg

LOKA KOMITATO .(alfabete)

BAUER Hans, Lernejdirektoro, Eisenstadt, Burgenland
CECH Raimund, ef.Oficonsilisto en Ministerio p.Internaj Aferoj, Wien
CHALOUPKA Dro Eduard, Sekcia Ĉefo kaj Prezidejestro en la Federacia Kancelierejo, Wien
DÜRRSCHMID Karl, Oficisto, Klagenfurt, Kärnten
EBNER Friedrich, Komercisto, Klosterneuburg ĉe Wien
HALBEDL Dro Adolf, Advokato, Knittelfeld, Steiermark
KAPS Josef, Paroĥestro, Plainfeld, Salzburg
MUDRAK Walter, Bankoficisto, Wien
SINNER Oskar, em.Majoro,Del.de UEA,Vicprezidanto de IEMW, Wien
SCHWARZ Johann, Oficisto,Felixdorf, Niederösterreich
STEINER Hans,Financoficisto,Iniciatinto de la Zamenhof-Monumento en Wörgl, la unua en Eŭropo
STEINER Hugo, Kortega Konsilisto, Fondinto kaj Direktoro de IEMW, Wien
STEINER Dro Lothar, Sekcia Konsilisto en la Feder.Kancelierejo, Wien
TSCHOM-Friedrich, DiplInĝ.en la Feder.Fervojdirekcio, Linz, Oberösterreich
WEBER s-ino Marie, Sekretariino en IEMW, Wien.

La Magistrato de la urbo WIEN jam konsentis disponigon de loko por starigo de la Zamenhof-Monumento !
Nun Loka Komitato dissendas ĉi tiun cirkuleron kun la peto, ke la Landaj Organizoj publikigu la alvokon en la Landa E-gazeto kaj instigu al kontribuo por la Monumento, ke la Esp.-grupoj kaj kluboj publikigu ĝin en siaj Bultenoj kaj cirkuleroj kaj persone varbu al kontribuo kaj ke la unuopaj esperantistoj varbu inter sia gekonatularo kaj mem kontribuu. Eĉ la plej malgranda obolo estas bonvena !

La nomoj de ĉiuj donacintoj estas publikigataj en "Informilo de IEMW .
Kiu donacos almenaŭ 5 intern.poŝtrespondkuponojn aŭ la egalvaloron, ricevos foton de la Monumento krome !
Kiu donacos almenaŭ 10 int.r.k. estos eternigata sur tabuloj en la Panteono, ricevos la foton kaj ankaŭ estos eternigata en la Dokumento pri la kreo de la Monumento,kiu estos enmurigata en la soklo de la Monumento !
Ĉiu inter vi varbu kaj kolektu monon ĉe viaj konatoj (ankaŭ ne-esperantistoj) kaj sendu de tempo al tempo al ni la liston kun la adresoj de la donacintoj.
La donacoj povos esti sendataj au rekte al

"Internacia Esperanto-Muzeo en Wien,I.Hofburg,Aŭstrio"

kun aldono "Zamenhof-Monumento" en simpla letero kun respondkuponoj au vialanda bank-bileto aŭ en nacia mono al la Reprezentanto de IEMW en via lando (vidu en "Informilo") aŭ al UEA en ROTTERDAM, Eendrachtsweg 7 .

Ni fiksas jenajn premiojn :

a) por grupoj aŭ unuopuloj ,kiuj donacis almenaŭ en la valoro de 50 resp.kup.
   1.premio :Katalogo de IEMW (ĉiuj 3 volumoj) almenau pli ol 700 paĝoj
   2. " Katalogo de IEMW (volumoj 1 kaj 2)almenaŭ 500 paĝoj
   3. " Katalogo de IEMW (volumo 1-a, 461 paĝoj)
   4 - 13 po unu Esperanto-libro el la duoblaĵoj de la Muzeo
b) por grupoj kaj unuopuloj, kiuj kolektis kontribuojn de almenaŭ 50 resp.kup.
   la samaj premioj kiel sub a).

La disdonado de la premioj okazos laŭ la alteco de la kolektita aŭ donacita mono !

Kun plezuro ni sciigas la ĝisnunan enpagon de kontribuoj jam antaŭ la dissendo de ĉi tiu cirkulero:

| | | |
|---|---|---|
| Esperantogrupo, pli poste sciigota | S | 3000.-- |
| Unuopulo ,pli poste sciigota | S | 600.-- |
| MABESOONE P.M.,Vicprez.de UEA, Amsterdam | Gld. | 75.-- |
| MAILLARD Dro,Dojeno,Bourg-la-Reine | frfr | 10000.- |
| BASTIEN Louis,Honorprez.de UEA,Paris | frfr | 5000.-- |
| WÜSTER Eugen,Doc.Dro techn.,Wieselburg | S. | 500.-- |
| KAFTAN Rud.,Dir.Horloĝmuzeo,Wien | S | 30.-- |
| KALOUMENOS P.,ATHINAI | S | 30.-- |
| STEINER Dro Lothar, Wien | S | 100.-- . |

La tuta Monumento kostos proksimume S 40.000.- kaj jen proksimume kun S 6000.- ni komencas la varbadon. Neniu postrestu !

Hugo STEINER,
dir.de IEMW, iniciatanto.

- - - - - - - - - - - - - -

<u>INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO en WIEN invitas vin :"Venu al Wien !"</u>

Multaj el vi ne ankorau konas la belegan urbon Wien,ties ĉirkaŭaĵon kaj .... sian en la mondo unikan Intern.Esperanto-Muzeon (IEMW) !

Por forigi ĉi tiun mankon IEMW invitas vin,veni por unusemajna malmultekosta restadoen la tempo de 21.julio-27.julio 1957 kaj la dua de 18.-24.aŭgusto 1957. Noktigejo en hejmo de Universitataj Studentoj en 1,2 kaj 4-litaj ĉambroj.Vizito de IEMW,Salonegaro de Hofburg,Trezorejo,Art- kaj natursciencaj Muzeoj,rondveturado en aŭtobusoj tra la urbo kaj al Kastelo BELVEDERE(kie Ŝtatkontrakto estis subskribita), al Kahlenberg kun belega Panoramo.-Ekskursoj al Kastelo SCHÖNBRUNN(vizito de la parko, Salonegaro,Palmodomego)kaj al PRATER per specialtrajnoj.Krome ekskurso per fervojo al sur SCHNEEBERG (2000 m alta)per dentradfervojo.-Ekskurso per specialaŭtobusojal Kastelo KREUZENSTEIN(20 km de Wien),vizitado kaj poste al "HEURIGER"(elverŝo de lastjara vino) en LANGENZERSDORF, Wienerstrasse 10.-Ĉiuj manĝoj sen trinkaĵoj,nur ĉe Heuriger ĉiu ricevos 1/4 litron da bona vino senpage. En la ege malalta prezo de la tuta aranĝo de nur aŭ.Ŝ. 410.- estas enkalkulataj 6 noktigejoj,6 matenmanĝoj, 6 tagmanĝoj,6 vespermanĝoj krome la ekskursoj,vizitadoj,veturadoj ktp. Vi nur pagu la veturadon al Wien kaj reen ! Demandu ĉe via vojaĝoficejo pri la plej malmultekosta veturado !
Interesuloj anoncu sin kiel eble plej baldaŭ,ĉar por ĉiu menciita semajno nur estos loko por proksimume 100 personoj. Kun la sinanonco sendu al IEMW 10 resp.kup.,kiuj ne estos redonataj,se iu ne venos.Alie ili estos enkalkulata en via kotizo.Ĝis 1.de junio la mono ,almenau la duona, do S 200.- devos esti sendotaj al ni.

Al demandoj aldonu respondkuponon. Ankaŭ familianoj povos partopreni sub samaj kondiĉoj.Familioj loĝos kune! Demandu la partoprenintojn de la lastjara Fervojista Feriosemajno kaj vi certe venos. Kore Hugo Steiner, IEMW.

## ESPERANTAJ MANIFESTACIOJ EN BOLONJO

### XXI° BOLONJA FOIRO + BOLONJA ESPERANTA GRUPO "A. TELLINI"

Kiel jam antaŭ sciigis preskaŭ ĉiuj Esperanto-gazetoj, okazis en Bologna dum la tagoj 18-a kaj 19-a de majo, samtempe kun la Nacia Kunveno de la Italaj Estraroj, la atendita studtago pri la rilatoj de Esperanto kun Industrio, Komerco kaj Turismo, en la ejoj kaj en la kadro de la oficialaj manifestacioj de la XXI-a Bolonja Foiro.

Dum la tuta daŭrado de la Foiro la Bolonjaj Esperantistoj elmontris en bele aranĝita Stando efikan dokumentadon pri la temo de la konferenco, konsistanta el materialo sendita de la tutmondaj Samideanoj. La 18-an de majo kunvenis en la Urbon delegacioj de la tuta Italujo kaj ankaŭ de eksterlando, kaj renkontiĝis kaj amuziĝis dum interesa interkona vespero. La sekvintan tagon, post la Diservo, dum kiu Pastro Carolfi prelegis Esperante kaj oni akompanis la ceremonion per Esperantaj kantoj, la multenombra Samideanaro per senpagaj aŭtobusoj ~~kunvenis~~ kuniris al la Kunvena Foira Salono, kie la Prezidanto de Universala Esperanto Asocio, Prof. Canuto, malfermis la solenan kunsidon, kaj post la parolado de la oficiala relatoro Inĝenjero Orengo de Milano, okazis interesega diskuto. Ĉeestis ĉirkaŭ tricent Samideanoj el tridek Urboj, kaj ankaŭ la reprezentantoj de la loka Provizoro pri Studado, de la Foirestroj, de la Komunumo kaj de aliaj Publikaj instancoj.

Je la dektria, post varmgastiga akcepto de la Urbestraro, oni kunemanĝis frate kaj ĝoje. De la dekkvina ĝis la deksepa, dum la Estroj kunvenis por organizaj diskutoj en aparta ejo, la aliaj vizitis la Urbon, la Foiro kaj precipe la tre interesan elmontron de novaj kaj malnovaj horloĝoj; kaj je la 17-a, kunvokitaj Esperante per la laŭtparolilioj de la Foiro, ĉiuj rekunvenis en la Foira Salono ~~de la Kunveno~~ kaj oni rekomencis la diskutojn kun la persona ĉeesto de la Urbestro On. Dozza; kaj post viglaj kaj gravaj diskutoj, oni konkludis la belan tagon per himnoj, salutoj, promesoj de ofta kaj baldaŭa revido. Eble ne estas senutile memorigi unu proponon el multaj: la starigon de Esperanta tradukaj oficejoj por elport- importaj firmoj en ĉiuj Urboj, kie internacia komerco estas precipe vigla.

La plena sukceso de la iniciato ebligas la esperon ke ĝi povos reokazi ĉiujare kaj ĉiam pli daŭre, tiel ke multaj Samideanoj kaj nesamideanoj kompetentaj povu partopreni ĝin, kun utilo por nia movado kaj por la Foiro mem.

Lasta limdato: Post la 30-a de junio plu ne estos akceptitaj aliĝiloj. En la kongresejo ne ekzistos tagaj kartoj. L.K.K. atentigas la prokrastemajn esperantistojn pri la neceso tuj aliĝi al la Universala Kongreso.

Kongresaj sekcioj: La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Kongreso laboru en tri sekcioj:

UNUA SEKCIO: Esperanto en la Edukado (en kunlaboro kun I.L.E.I.). Prezidanto: S-ro D. Kennedy.

DUA SEKCIO: La Internacia Lingvo en Scienco kaj Tekniko (organizita de U.E.A. kaj I.S.A.E.). Prezidanto: Prof. D-ro Ivo Lapenna.

TRIA SEKCIO: Esperanto en Komerco kaj Turismo. Prezidanto: S-ro P. Petit.

Statistiko: (ĝis fino de aprilo) Alĝerio 4, Aŭstrujo 22, Aŭstralio 1, Belgujo 13, Brazilo 4, Britujo 67, Bulgarujo 23, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 26, Finnlando 10, Francujo 343, Germanujo 91, Grekujo 1, Hispanujo 32, Hungarujo 2, Italujo 110, Izraelo 1, Jugoslavio 42, Japanujo 2, Kongo Belga 2, Maroko 14, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 41, Norvegujo 14, Novzelando 2, Pollando 7, Portugalujo 5, Rumanujo 2, Sudafriko 2, Svisujo 20, Svedujo 103, Turkujo 2, Usono 6, Venezuelo 1. Entute 1025 el 35 landoj.

Konstanta Kongresa Sekretario: Gian Carlo FIGHIERA

## KONFERENCO PRI POPOLAJ UNIVERSITATOJ

Estos organizota en Parizo en la U.N.E.S.K.O.-Palaco dum la tagoj 31-a de julio kaj 2-a de aŭgusto, la unuan Internacian Konferencon pri Popolaj Universitatoj.

La lingvoj akceptitaj dum la Konferenco estas: franca, angla, germana kaj esperanta. La tradukoj estos farataj nur en Esperanto.

Tiu grava novaĵo venis de la Popola Universitato en Roma (Piazza Collegio Romano)

Estus vera bedaŭrindaĵo se sufiĉa nombro da Esperantistoj ne partoprenos tiun ĉi gravan kunvenon.

## D A N K O

Okaze de la ĵus fermita Foiro de Bologna la Esperanto-Grupo "A.Tellini" el Bologna, feliĉa pro la atingita bonsukceso de sia Esperanta Ekspozicio, sendas, per tiu ĉi mallonga informo, mildankojn al ĉiuj samideanoj kiuj volis helpi min en tiu okazo, per sendado de utila propaganda materialo kaj per sia interveno.

Ĉar ne estas eble respondi individue al ĉiuj helpentoj, la Estraro de la Grupo sin petas pardonon kaj sendas al ĉiu lando al ĉiu grupo la plej koran senton de sia dankeco kaj sindoneco.

## PARADIZAJN FERIOJN EN GRANDA PARADIZO

"Ceresole Reale" estas la plej fama turisma centro de Valo Orko ĉe la limo de Nacia Parko de "GRANDA PARADIZO".

Je 1.500 metroj de alteco, surborde de sia ensorĉa lago, "Ceresole Reale" estos, ankaŭ ĉi jare, sidejo de la tradicia somera aranĝo de Itala Esperanto Federacio.

Vi trovos, tie, idealan medion por via libertempo kaj, inter la neforgeseblaj panoramoj de la italaj Alpoj, vi vere ĝuos "Paradizajn feriojn".

Tri semajnaj vicoj de la 4-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1957. Ĉiu semajna restado, laŭvole ripetebla, komenciĝos kaj finiĝos dimanĉe je la 10-a matene. La kotizo sumas je 8.800 italaj liroj inkluzive de: tranokto en modernaj tendoj ligno pavimitaj kaj elektre lumigataj; septaga kompleta pensiono laŭ itala kuirado (matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo, sen vino). Pliiĝa kotizo por tranokto en dulita aŭ kvarlita ĉambro. La restadejo situas en domo centre de la vilaĝo kaj la tendoj staras en belega pozicio vidalvide al lago. Ĉiu tendo enhavas kvin aŭ ses litojn ekipitajn per matraco, kuseno kaj du litkovriloj. En la domo, krom la dormoĉambroj, estas la servoj, la kuirejo kaj la komuna manĝoĉambro.

"Ceresole Reale" kuŝas je 80 Km. nord-okcidente de Torino (Italujo) kaj ĝi estas atingebla per aŭtomobilo, per trajno kaj aŭtobuso.

Informojn kaj prospekton ricevoblaj ĉe: I.E.F. Turismoficejo, Casella Postale 248, Torino (Italujo).

# INTERNACIA EKSPOZICIO PRI ARTO INTER LA FERVOJISTOJ

**Bologna - Salonego de la "Podostà" 5 - 13 de junio 1957**

La Majstra kaj solena palaco "Re Enzo" akceptas la Internacian Ekspozicion pri Arto inter la Fervojistoj de Aùstrujo, Belgujo, Francujo, Germanujo, Jugoslavio, Luksemburgo, Svislando kaj Italujo.

Estis la Eùropaj Fervojistoj kiuj renkontis sin en nobla konkurso, kaj atestis al siaj laboraj kolegoj kaj al la Itala publiko sian lertecon kaj sporton ankaù en la arta kampo. Estis la fervojistoj de pluraj naciej kiuj parolis al aliaj kamaradoj de laboro pere de la lingvo de la arto kaj ni Esperantistoj, kiuj batalas por interkompreniĝo inter la popoloj, estas vere kontentaj partopreni al tiuj manifestaciej de frateco kaj kompreno.

La luksa kornico de Bologna la "Dotta" (klera) kaj afabla estas vere la plej digna kiel eble plej.

La ekspozicio okazas sub la aùspicoj de la F.I.S.A.I.C. (Federazione Internazionale delle Società Artistiche e Intellettuali dei Ferrovieri) kaj estis organizita de la Centra Oficejo de la "Dopolavoro Ferroviario" (Postlaboreca Klubo) en Romo kaj efektivigita de la "Dopolavoro Ferroviario" en Bologna.

La enhavo de la ekspozicio konsistas el 228 pentraĵoj, 18 skulptaĵoj kaj 31 verkoj laù blanko kaj nigro.

La Honora Komitato konsistas el:
Hon. Armando Angelini, Ministro pri la Transportoj
D-ro Inĝ. Severo Rissone Ĝenerala Direktoro de la Italaj Ŝtatfervojoj
D-ro Aurelio Gaipa Provincestro de Bologna
Hon. Giuseppe Dozza, Urbestro de Bologna
D-ro Prof. Gherardo Forni Rektoro de la Bologna Universitato
Adv. Roberto Vighi, Prezidanto de la Provinco de Bologna
Monsieur Prof. Marcel Mollion, Komandoro de la "Legion d'Honneur", Prezidanto de la F.I.S.A.I.C.
D-ro Inĝ. Pasquale Giobbe, Personarestro de la Italaj Ŝtatfervojoj
D-ro Inĝ. Raffaele Niccoli, Supera Zorganto pri Monumentoj
D-ro Prof. Giovanni Merlini, Prezidanto de la Komerca Ĉambro
D-ro Giankarlo Pascale, Prezidanto de la Provinca Turismoficejo.

Merkredon, la 5-an de junio okazis la solena inaùguro de la ekspozicio kun la ĉeesto de S-ro Mollion Ĝenerala Prezidanto de la F.I.S.A.I.C., Birbaum Ĝenerala Sekretario de la sama organizaĵo, S-ro Hazard de la Belgaj Fervojoj, kaj la Delegitoj de ĉiuj naciej partoprenintaj. Pri Italujo ĉeestis D-ro Branca Ĝenerala Vicdirektoro kaj Inĝ. Alfredo Angelini, Fervoja Departamentestro en Bologna, kiuj reprezentis la Ministron kaj la Ĝeneralan Direktoron, kaj D-ro Rag. Pasquale Lazzaro, estro de la Centra Oficejo de D.L.F., ĉeestis ankaù aliaj Fervojaj Departementestroj kaj la Organiza Komitato gvidata de D-ro Inĝ. Giuseppe De Giuli kaj S-ro Angelo Giacomoni.

La inaùguraĵn paroladojn faris D-ro Inĝ. Alfredo Angelini kaj Prof. Mollion, kiu substrekis la fratan karakteron kiun havas la manifestacio kaj dankis la Urbon Bologna pro la varma gastamo kiun ĝi rezervis al la partoprenintoj al la Internacia Ekspozicio.

Poste, la delegitoj vizitis la indajn instalaĵojn de la Somera Sidejo de la "Dopolavoro Ferroviario" kie la orkestro de la "Dopolavoro Ferroviario" de Milano ludis muzikon kaj poste la trupo de la junaj artistoj de la "Dopolavoro Ferroviario" de Bologna ludis artan spektaklon.

Okaze de la Internacia Ekspozicio, la Organiza Komitato eldonis luksan katalogon de la verkoj.

GIMELLI p.i. Germano

## ZAMENHOF MONUMENTO

Laù iniciato de S-ano Hugo Steiner oni starigos en 1958 en Vieno, modestan sed indan monumenton al nia Majstro. La protekteraton transprenis Federacia Kanceliero de Aùstrujo S-ro Inĝ. Julius Raab. En la Honora Komitato oni invitis la estraro de U.E.A., la Prezidantoj de S.A.T., I.K.U.E.kaj U.L. kaj kelkaj aliaj eminentaj Samideanoj. Al la Loka Komitato apartenas ankaù nia fervora kolego Friedrich TSCHOM, Dipl. Inĝ. en la Federala Fervojdirekcio kaj estro de la Austria Sekcio de I.F.E.F.

La Magistrato de la Urbo Vieno jam konsentis disponigon de loko por starigo de la monumento. La Loka Komitato petas al la landaj esperantogazetoj kaj bultenoj varbi kontribuantoj, por ke per komunaj fortoj la Esperantistaro kolektu la bezonatajn 40.000 Aùstrajn Ŝilingojn. Jam 6000 oni ricevis de nur kelkaj eminentaj S-anoj.

Respondkuponoj povas esti sendataj rekte al Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Aùstrujo, en simpla letero kun aldono "Zamenhof-Monumento". La nomo de ĉiu donacinto estos publikigata en Informilo de I.E.M.W.

Kiu donacas 5 respondkuponojn ricevos foton de la monumento, kiu donacas almenaù 10 r.k. estos eternigata sur tabuloj en la Panteono kaj en la Dokumento pri la kreo de la monumento, kiu estos enmurigata en la monumenta soklo. Eĉ la plej malgranda kontribuaĵo estas bonvena.

**INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO en WIEN invitas vin: "VENU AL WIEN !"**

Multaj el vi ne ankoraù konas la belegan urbon Wien, ties ĉirkaùaĵon kaj sian Internacian Esperanto-Muzeon, unikan en la mondo.

Por forigi ĉi tiun mankon I.E.M.W. invitas vin, veni por unusemajna malmultekosta restado en la tempo de 21-a ĝis 27-a de julio 1957. Vizito de Hofburg, art- kaj naturscienaj Muzeoj, rondveturado en aùtobusoj tra la urbo kaj al Kastelo Belvedere, al Kahlenberg, k.t.p. Ekskursoj al Kastelo Schönbrunn kaj al Prater per specialtrajnoj. Krono ekskurso per fervojo al sur Schneeberg (2000 metroj alta) per dentradfervojo. Ekskurso per specialaùtobusoj al Kastelo Kreuzenstein (20 km. de Wien), vizitado kaj poste al "Heuriger" en Langenzersdorf.

En la ege malalta prezo 400 aùstr. Ŝilingoj, estas enkalkulataj 6 tranoktoj, 6 matenmanĝoj, 6 tagmanĝoj, 6 vespermanĝoj kaj ĉiuj ekskursoj, vizitoj, veturadoj ktp.

Ankaù familianoj povos partopreni. Kun via anonco sendu 10 respondkuponoj al Internacia Esperanto-Muzeo.

Demandu la partoprenintojn de la lastjara Fervojista Feriosemajno kaj vi certe venos.

## FERIOSEMAJNO EN NEDERLANDO

Kiel pasintan jaron la grupo Zwolle de F.E.R.N. organizos feriosemajnon por Fervojistaj Esperantistoj kaj ties familianoj. Rajtas ankaù partopreni limigita nombro de ne-Esperantistoj; la Esperantistoj montru al la ne-Esperantistoj la taùgecon de Esperanto en la praktiko. La feriosemajno okazos de la 7-a ĝis la 14-a de septembro.

Tranoktado en la konata feriodomo "de Leemkule" en arbarriĉa pejzaĝo en la proksimeco de Zwolle. Kostoj por la tuta semajno: 55 guldenoj por tranoktado, ĉiuj manĝoj, aùtobusekskursoj, k.t.p. Ekskursoj al N.O. kaj S.O. polderoj, Arnhem, Amsterdam, Marken en Volendam.

Anoncu vin sufiĉe frue! Pliajn informoj se necese donas: W. Golderman, W. berentszstraat 70, Zwolle, Nederlando.

## LASTMOMENTE

Ni anoncas al nia legantaro la edziĝon de Samideanoj MARIA TERESA PIPINO kaj RENATO PENNAZIO kiu okazos en la Preĝejo "S. Egidio" en Moncalieri (Torino) la 23-an de junio 1957-a. Ni kaptas la okazon por sendi al la ekedzoj varmajn bondezirojn.